

Claude Gacond intervjuas s-ron Giorgio Silfer pri la Patrolo

SRI-1977-12-A-2-88

<http://www.esperanto-gacond.ch/SRI/Radiokasedo-1977-12/SRI-1977-12-A-2-88-Claude-Gacond-Intervjuo-kun-sinjoro-Giorgio-Silfer-pri-la-Patrolo.mp3>

CG.- Parolas Claude Gacond. Hodiaŭ mi havas la honoron daŭrigi serion da intervjuoj kun s-ro Giorgio Silfer, ĉefredaktoro de Literatura Foiro. La pasintan semajnon, s-ro Silfer, kiam vi parolis pri la internacia kultura revuo Literatura Foiro, vi raportis pri la ekzisto kaj aktiveco de la literatura rondo, la Patrolo. Nun ni ŝatus scii pli pri tiu ĉi Patrolo.

GS.- La Patrolo naskiĝis en Milano, en majo 1969-a, fondita de mi, de s-ino Manuela Bottiglioni kaj de d-ro Carlo Minnaja, nuntempe akademiano de Esperanto. Komence ni havis relative primitivan celon, tio estas, ni volis akiri por la italaj literaturistoj lokon en la verda parnaso. Ni strebis unuflanke kultivi, elfosi la malmultajn erojn de la itala tradicio en la esperanta originala literaturo kaj aliflanke starigi embrion de estonta itala skolo. Iom post iom aliĝis novaj membroj, perdiĝis malnovaj. Nuntempe la Patrolo konsistas el sep homoj, mi kaj Minnaja, la du fondintoj plus Nikolino Rossi la nuna patrolestro, altestimata poeto, kaj Pomperno ankaŭ akademiano de Esperanto, Gaudencio Bisoni, kiu estas unu el la plej lertaj tradukistoj en naciaj lingvoj, Gianluigi Gimelli, originala poeto el Bolonjo kaj ankaŭ sviso, itallingva sviso, Tazio Carlevaro.

CG.- Ĉu tamen la celado de la Patrolo ne akiris novajn perspektivojn en la aktuala tempo ?

GS.- Efektive, ni havis la okazon konstati ankaŭ dum la lasta Patrol-kunsido en Napolo, dum la monato majo de ĉi tiu jaro, ke io evoluis dum ĉi tiuj preskaŭ dek jaroj. Unuflanke ni devas rimarki ke eĉ la plej aktivaj membroj de la Patrolo aŭ ne estas italaj civitanoj, aŭ ne loĝas en Italujo. Mi mem loĝas en Finnlando, Carlevaro estas sviso, kaj Nikolino Rossi, la patrolestro estas civitano de Respubliko Sanmarino. Do tio donas iomete la impreson, la bildon pri tiu ĉi rondo, kiu havas iun ĝeneralan itallingvan kulturalan fonon, sed efektive ne povas resti tute provinca grupo. Krome, mi devas diri ke multaj iniciatoj de la Patrolo iom post iom sendependiĝis de la rondo kaj eniris la grandan kadron de Literatura Foiro. Literatura Foiro estas fakte la organo de la Patrolo, do ĝi estas en rekta rilato kun tiu ĉi rondo, sed aliflanke nun interne de Literatura Foiro funkcias libro-fako, funkcias literatura premio, kiu siatempe estis tute sendependaj de la revuo. Mi volus diri ke menciante la ŝanĝon, kiu okazis en la organiza manifesto de la Patrolo ĉi-jare en Napolo, la celo estas ĉiam aligi junajn literaturistojn aŭ kiel eble plej junajn literaturistojn kaj samtempe tamen ne necesas ke ili estu literaturistoj, povas esti esperantologoj kun iu itallingva kultura fono kaj precipe ke ili estu pretaj engaĝi sin en eldona aktivado, ĉar en Italujo kaj por itallingvaj esperantistoj oni terure sentas la mankon de taŭga materialo, ĉu didaktika, ĉu ne, en Esperanto kaj pri Esperanto.

CG.- En la libro Esperanto en perspektivo, oni mencias la Patrolon kiel italan skolon. Ĉu vi akceptas tiun ĉi vidpunkton ?

GS.- Dependas de la signifo de tiu vorto 'skolo'. Se oni volas nin turni en la ĝenerala koncepto kiun ŝajne akceptis la kompilintoj de Esperanto en perspektivo, eble jes. Literatura Foiro, la Patrolo estas itala skolo, ĉar estis ĉiuj italoj, kvankam ne ĉiuj efektive, ĵetitaj kune en la saman kaldronon. Sed laŭ tio, kion mi lernis, skolo devas ankaŭ distingiĝi pro poetiko, propra poetiko, propra stilo, propraj tendencoj kaj ĉi-kaze ni ne devus paroli pri la Patrolo kiel

skolo, same kiel ni ne devus paroli pri la Budapeŝta skolo. Vidu, estas relative heterogena grundo, principe ni povas diri ke unuflanke estas homoj, kiuj konsideras sin entreprenistoj, kiuj decidis fondi revuon en Esperanto kaj pere de ĝi krei kulturalan alternativon, dum aliflanke estas eble esperantistoj, kiuj volis simple de tempo al tempo kunveni por babili en sia kara lingvo. Tamen tiu ĉi estas tro redukta difino. Mi dirus, ke la afero estas ankaŭ pli unueca.

CG.- Sinjoro Giorgio Silber apud sia ĉefredaktoreco de Literatura Foiro, ankaŭ prizorgas ĉefredaktadon de Kontakto. La venontan semajnon ni daŭrigos nian konversacion kun li farante al li demandojn pri la revuo Kontakto.

Vi aŭdis intervjuon el Svislando. Claude Gacond parolis kun sinjoro Giorgio Silber. Ĝis reaŭdo!

*Kopirajto © Claude GACOND, www.esperanto-gacond.ch
Prilaboris: [Stefano KELLER](#), novembro 2013*